Joseph Freiherr von Eichendorff,

La gaja migranto

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Se donas Di' al vi favoron,
Li sendas vin for el la dom',
Por montri sian mirlaboron,
La belan mondon, al la hom'.

.....
.....
.....
.....

De l' montoj riveretoj fluas,
Alaŭdoj kantas super mi;
Mi ankaŭ gajan kanton bruas
Al la tutmonda harmoni'.

Al Dio fidas mi kun ĝojo.
Li zorgas pri la tuta ter':
Li ankaŭ min, sur mia vojo,
Eterne gardos de danĝer'.

. . .

Joseph Freiherr von Eichendorff,

La gaja migranto

tradukita de Ludwig Emil Meier

Se Dio volas vin favori,
Li igas iri vin tra l'mond'
Por mirindaĵojn al vi montri
En sia kreitaĵa rond'.

La malviglul' en hejma domo
Ne ĝojas pro mateno lum',
Lulanta li infanojn homo
Zorgadas nur pro la mastrum'.

Riveroj plaŭdas de l'montaro,
Alaŭdoj ĝojas en aer' -
Ĉu mi ne kantu kun birdaro
Pro la de Dio bela ter'?

Kaj mi nur fidas bonan Dion,
Pro kiu konserviĝas ĝi;
Ĉu mi do zorgu, timu ion?
Pro li prosperos ankaŭ mi!

. . .

Joseph Freiherr von Eichendorff,

Der frohe Wandersmann

Wem Gott will rechte Gunst erweisen,
Den schickt er in die weite Welt,
Dem will er seine Wunder weisen
In Berg und Wald und Strom und Feld.

Die Trägen die zu Hause liegen,
Erquicket nicht das Morgenrot,
Sie wissen nur von Kinderwiegen,
Von Sorgen, Last und Not um Brot.

Die Bächlein von den Bergen springen,
Die Lerchen schwirren hoch vor Lust,
Was soll ich nicht mit ihnen singen
Aus voller Kehl und frischer Brust?

Den lieben Gott laß ich nun walten,
Der Bächlein, Lerchen, Wald und Feld
Und Erd und Himmel will erhalten,
Hat auch mein Sach aufs best bestellt.

. . .

Traduko de la Germana poemo "Der frohe Wandersmann" de Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-234-462 (2008-04-01 19:09:17)

Traduko de la Germana poemo "Der frohe Wandersmann" de Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919) en 1907.*

Arg-234-463 (2006-05-07 20:26:26)

La tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la libro "Esperantista Kantaro", Kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzer Str. 44.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26).*

Arg-234-461 (2012-10-04 22:20:58)

Lau poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Friedrich Theodor Fröhlich. Vidu: `http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=300144` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Theodor_Fr%C3%B6hlich`*.*